

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



10

SOFIA — OKTOBRO 1961

## E N H A V O

	Paĝo
* * * — Deklaro de Registaro de Popola Respubliko Bulgario	1
<b>T. Jivkov</b> — Packontrakto kun Germanio — neprokrastebla tasko	3
* * * — Deklaro de Centra Komitato de Bulgara Esp.-Asocio	3
* * * — Telegramo al Packomitato en GDR .	4
<b>N. Nanov</b> — Programo-himno de ciuj progresemaj homoj en la mondo .	4
* * * — Ordene dekorita Esperanto-pioniro	5
<b>Krum Velkov</b> — Kion povas iufoje porti en si malnova kaskedo	6
<b>K. Gusev</b> — La gloro . . . . .	6
<b>Joh. R. Becher</b> — Himno de Germana Demokrata Respubliko	7
<b>Annie van der Horst</b> — Patrino	7
<b>Ĥr. Smirenski</b> — Tempesto en Berlino	8
* * * — Rusa popolkanto	8
<b>Efim Fleis</b> — Pasis kvindek jaroj . . . . .	9
<b>Atanas D. Atanasov</b> — ADA — Leclonoj por lingva perfektigo	10
JUNULARO SUR POSTENO .	12
ORGANIZA VIVO .	13
LETEROJ EL FREMDLANDO	17
DEZIRAS KORESPONDI	17

*Abonkotiizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.*

*Reklamtarifo: 5 levoj por cm<sup>2</sup>; korespondanoncoj: 0,5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 1000 v.*

### LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

**ALBANIO:** Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

**ITALIO:** Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

**KOREO:** Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

**NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

**RUMANIO:** Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

**SOVETUNIO:** J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.

**SVEDIO:** Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa bildo: Esperanto-kurso en vilaĝo Drujevo

## DEKLARO

### *de la Registaro de Bulgara Popola Respubliko*

*La Registaro de Bulgara Popola Respubliko estas serioze maltrankviligita pro la fakto, ke dek ses jarojn post la fino de la Dua Mondmilito la packontrakto kun Germanio ankoraŭ ne estas subskribita kaj ke la konsekvencoj de la milito ankoraŭ ne estas likviditaj. La manko de packontrakto streĉas la internacian situacion kaj malhelpas la solvon de vico da aliaj problemoj. La Bulgara Registaro estas profunde konvinkita, ke por fini ĝi tiun nenormalan situacion, estas necese senprokraste alpaŝi al la subskribo de la packontrakto kun Germanio.*

*Dum la lastaj jaroj, instigata de la okcidenteŭropaj ŝtatoj, la Registaro de Okcidenta Germanio en rapida ritmo organizas siajn armitajn fortojn, denove gvidatajn de ekŝitleraj generaloj, pretendantoj pri atomaj armiloj. Neniu povas garantii, ke la okcidentgermanaj regantoj, impete rapidantaj al la kreo de sia armeo kaj ĝia armo per atoma kaj hidrogena armilo, ne kaŭzos la incendion de la Tria Mondmilito.*

*La respondeco pri la renaskiĝo de la germana militismo kaj faŝismo apartenas al la okcidentaj landoj, kiuj ne plenumas la plej gravajn interaliancajn interkonsentojn, celantajn la elradikigon kaj la malpermeson de la germana militismo sub kia ajn formo. La respondecon pri la renaskiĝo de la germana militismo portas la Registaro de Germana Federacia Respubliko, kiu malakceptis ĉiujn prudentajn proponojn de Germana Demokrata Respubliko pri traktado kaj reunuigo de la ambaŭ germanaj ŝtatoj, kaj aliĝis al la agresiva Nordatlantika bloko nur kun la celo armi la Okcidentan Germanion kaj prepari ĝin por revenĝo.*

*En Okcidenta Germanio la popolo vivas en cirkonstancoj de sentesa furiozo de la revenĝo. Oficialaj reprezentantoj de la Registaro de Bonn starigas voĉon pri revizio de la ekzistantaj landlimoj. Okcidenta Berlino estas transformita de la revenĝantoj de Bonn en arenon de protestaj manifestacioj kaj provokoj kontraŭ la pacamaj fortoj de la germana popolo kaj de ĉiuj socialismaj landoj. Misuzante la eblojn vizitadi la Okcidentan Ber-*

linon, en ĝi tre ofte aperas plej respondecaj gvidantoj de la ŝtato de Bonn, kiuj organizas ĉiuspecajn amasiĝojn por fari provokajn paroladojn.

En sia historio la bulgara popolo dufoje spertis la konsekvencojn de agresiva politiko de la germana imperiismo kaj pro tio hodiaŭ ĝi prave alarmas kontraŭ la danĝero de rapida rekreo de la militismo kaj revenĝo en Okcidenta Germanio.

La Registaro de Bulgara Popola Respubliko deklaras, ke por bridi la okcidentgermanan militismon estas necese ke jam en la kuranta jaro la packontrakto kun ambaŭ germanaj ŝtatoj estu subskribita kaj sur tiu bazo Okcidenta Berlino transformiĝu en liberan senarmigitan urbon. Jen kial la Bulgara Registaro plene aprobas kaj apogas la konstantajn klopodojn de la Soveta kaj Orientgermana registaroj pri paca solvo de la germana problemo. Ĉiu prokrasto de subskribo de la packontrakto kontribuas al la plialtigo de la internacia tensio, pligrandigas la danĝeron pri eksplodo de militkonflikto, kiu en la tempo de perfekta militarmeo, povas puŝi Eŭropon kaj la tutan mondon al la terura katastrofo.

Per la subskribo de la packontrakto estos forigitaj la ebloj pri senĉesaj revenĝaj postuloj, pri ŝanĝo de la ekzistantaj germanaj landlimoj, kio ja ankaŭ kontribuos al la plifirmigo de la paco en Eŭropo.

La subskribo de la packontrakto likvidos ankaŭ la nenormalan situacion en Okcidenta Berlino. Per transformiĝo de Okcidenta Berlino en liberan senarmigitan urbon estos likvidita la danĝera fajrujo el la centro de Eŭropo. Al okcidenta Berlino estos garantita la paca evoluo kaj senobstakla ligo kun ĉiuj ŝtatoj.

La Bulgara Registaro gratulas la entreprenojn, kiuj la Registaro de Germana Demokrata Respubliko faras laŭ la rekomendoj de la ŝtatoj, subskribitaj la Varsovian Kontrakton por establo de severa kontrolo de la urblimoj de Okcidenta Berlino, por ĉesigo de la insida agado, direktata ne nur kontraŭ la Germana Demokrata Respubliko, sed ankaŭ kontraŭ la socialismaj landoj.

Estas necese, ke la registaroj de Usono, Britlando kaj Francio ebligu la ĉesigon de la nelojaloj kaj provokaj agadoj de la okcidentgermanaj revenĝistoj en Okcidenta Berlino, same kiel tio estas proponita en la notoj de la Soveta Registaro al la tri okcidentaj registaroj de la 24-a de la aŭgusto j. k.

La Bulgara Registaro deziras plej sincere la subskribon de packontrakto kun ambaŭ ekzistantaj germanaj ŝtatoj. Tamen, se la okcidentaj landoj daŭrigos rilati negative al la pacproponoj de USSR kaj de aliaj socialismaj landoj pri likvido de la restaĵoj de Dua Mondmilito estos farita tio ebla por subskribo de packontrakto nur kun la Germana Demokrata Respubliko, kiu jam esprimis sian pretecon tiurilate. La Registaro de Bulgara Popola Respubliko esprimas sian firman kaj neŝanceligeblan pretecon ĝis la fino de la kuranta jaro subskribi la kontrakton kun la Germana Demokrata Respubliko kune kun ĉiuj landoj, kiuj konsentos pri tio.

La bulgara popolo kaj ĝia Registaro batalos per ĉiuj fortoj por paca solvo de la germana problemo kaj konsideras necese memori al tiuj, kiuj provas minaci per uzo de forto, ke ili renkontos la detruigan kontraŭreziston de la unuigitaj fortoj de ĉiuj socialismaj landoj, kaj de ĉiuj pacamaj homoj el la tuta mondo.

Sofio, la 28-an de aŭgusto 1961.

## PACKONTRAKTO KUN GERMANIO — NEPROKRASTEBLA TASKO

Ni deziras, ke la demandoj pri Germanio kaj Okcidenta Berlino estu solvitaj laŭ paca maniero. La socialismaj landoj senhezite subtenas la politikon pri paca kunekzistado, pri solvo de la internaciaj problemoj per intertraktoj.

Tamen, se la okcidentaj landoj, malgraŭ nia deziro kaj klopodoj, provus inciti militon, ili devas bone koni: nun la epoko estas alia, nun la fortoj de la socialisma tendaro estas multe pli potencaj ol la fortoj de imperiismo, nun la socialismaj landoj disponas per tia arma potenco, kiu estas kapabla ne nur kontraŭstari al ĉiu agresulo, sed ankaŭ estas kapabla purigi unufoje por ĉiam la surfacon de la Tero de tiuj, kiuj konstante minacas la pacon, la liberecon kaj la sendependecon de la popoloj.

Ni rigardas al la estonteco memfide kaj trankvile. La publikigita antaŭ nelonge projekto por programo de la Komunista Partio en Sovet-Unio, kiun kun rajto oni povas nomi Komunistan Manifeston de nia epoko, malfermas majestan perspektivon ne nur antaŭ la sovetaj popoloj, sed ankaŭ antaŭ nia popolo, antaŭ la laboruloj en la tuta mondo. Ĝi nin inspiras al novaj grandaj agoj en la nomo de la paco, homara feliĉo kaj socia progreso.

**TODOR JIVKOV,**  
ĝenerala sekretario  
de la Bulgara Komunista  
Partio

### DEKLARO DE CENTRA KOMITATO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio kaj la tuta bulgara esperantistaro unuanime aprobas la Deklaron de la Registaro de Popola

Respubliko Bulgario pri solvo de la Germana kaj Berlina problemoj per pacaj rimedoj laŭ la vojo de reciproka intertraktado.

La bulgaraj esperantistoj, fidelaj al sia patriota kaj internacia devo kunhelpi aprezadon de kulturaj valoraĵoj en la kadro de UNESKO, esprimas sian maltrankvilecon pro la militpreparoj de la revengistaj imperiismaj rondoj en Okcidenta Germanio. Ili unuanime aprobas la proponojn de la Soveta Registaro por ĝenerala senarmigo, por malpermeso de la eksperimentoj per nukleaj bomboj, por paca ekzistado de la ŝtatoj kun malsamaj politikaj kaj sociaj sistemoj.

CK de BEA kaj ĉiuj bulgaraj esperantistoj deklaras, ke ili ankaŭ estonte en sia por-kajperesperanta laboro, ankoraŭ pli sisteme agos por diskonigi la veron kaj la sukcesojn pri nia socialisma patrio en konstruado de socialismo.

CK de BEA alvokas la bulgarajn esperantistojn kaj ĉiujn eksterlandajn esperantistojn subteni la pacajn proponojn de la Soveta Registaro kaj de la tuta socialisma tendaro.

Sofia, septembro 1961

*H. Bidstrup*



— Ssst! Silenton! La maljunulo Konrad provas trovi la solvon de la Okcident-Berlina problemo

## BERLIN

Karaj kamaradoj,

La amasa, solena kunveno de la esperantistoj en Sofio, okazinta la 28-an de septembro 1961, aŭskultinte en Esperanto la prelegon „Germana problemo kaj la monda paco“ de k-do Nikola Aleksiev, vicprezidanto de la Komitato por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando

decide kaj senrezerve subtenas la proponon de USSR pri senprokrasta likvido de la restaĵoj de la Dua Mondmilito, per subskribo de packontrakto kun la ambaŭ germanaj ŝtatoj kaj pri la arango de la jura sta-

to de Okcidenta Berlino kiel libera urbo.

Ni, la Sofiaj esperantistoj havas konsiderindan sperton en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj militprovokantoj kaj ni ne ŝparos niajn energiojn kaj scipovon klarigi nian starpunkton pri tiu problemo al niaj fremdlandaj korespondantoj kaj amikoj kaj ni estas pretaj subteni per ĉiuj rimedoj ĉiun entreprenon de la socialisma tendaro pri solvo de la germana problemo.

Por la kunveno:  
Canko Murgin

## PROGRAMO-HIMNO DE ĈIUJ

## PROGRESEMAJ HOMOJ EN LA MONDO

De certa tempo la monda atento estas altirita de la nova programo de Komunista Partio de Sovet-Unio. Ĝi estas tre grava teoria kaj politika dokumento de la komunismo en nia epoko.

La programo montras konsekvence kaj logike la neeviteblan pereon de la kapitalismo kaj ĝia nepra anstataŭigo de komunismo. En la nuna epoko la ĉefa, decidiga faktoro en la historia evoluo estas la monda socialisma sistemo. La fortoj, batalantaj kontraŭ la imperiismo, por socialisma transformigo de la socio difinas la ĉefan enhavon de nia epoko.

La kapitalismo estas la lasta ekspluatanta sociordo. Postkiam ĝi evoluigis altgrade la produktajn fortojn, ĝi transformigis en bremson sur la vojo de la homa progreso. Ĝi naskis en sia sino la forton, kiu ĝin neniigas — la laboristan klason. Pro tio la kapitalismo estas pereanta socisistemo. Super la mondo jam ŝvebas la printempo de la

homaro. La socialismaj revolucioj en la landoj de Eŭropo kaj Azio alvenigis la formigon de la monda socialisma sistemo. Nun unu triono de la homaro konstruas novan vivon sub la standardo de la scienca komunismo.

Per la Granda Oktobra Revolucio la Bolŝevista Partio irigis la landon sur la vojo de socialismo. Penega, malfacila estis la vojo, kiun devis trapasi la soveta popolo. La reakciaj fortoj de la malnova mondo faras ĉion eblan por sufoki la novan sovetan respublikon.

La soveta popolo travivis fremdlandan intervenon, intercivitanan militon, ekonomian izolon, teroron, komplotojn. La kontraŭuloj de la leninismo asertas, ke Rusio ne estis matura por socialisma revolucio, ke ne estus eble konstrui socialismon en unu sola lando. Sed la kontraŭuloj de la leninismo trompigis, — antaŭ iliaj okuloj la socialismo venkis ankaŭ en ekonomia fronto.

La sperto de Sovet-Unio pruvis, ke la popoloj povas atingi socialismon nur

rezulte de socialisma revolucio kaj diktaturo de la proletaro. Tiun sperton pruvis plene la fundamentaj principoj de la socialisma revolucio kaj de la socialisma konstruado, kiuj havas internacian signifon. La sperto pruvis, ke nur la socialismo povas neniigi la ekspluatadon de homo al homo, malebligi la ekonomiajn krizojn, senlaborecon kaj la mizeron de la popolamasoj.

En la programo trovis lokon ankaŭ la problemoj pri la milito kaj paco. La sola fonto de milita danĝero estas la imperiismo. La imperiisma tendaro preparas la plej grandan krimon al la nuntempa homaro — mondan nuklean militon, kiu ekstermos tutajn popolojn kaj kaŭzos neimageblajn detruojn.

La monopolisma burĝaro de Usono estas la ĉefa apogo de la internacia reakcio. Ĝi alprenis la rolon de „savanto“ de la kapitalismo. La financaj magnatoj de Usono starigis agresivajn militistajn blokojn. Usonaj militbazoj estas starigataj en la plej gravaj lokoj de la kapitalisma mondo.

Sed la imperiistoj trompas sin mem. Sovet-Unio kune kun la ceteraj socialismaj landoj fiaskigos iliajn planojn. Sovet-Unio konsekvence defendis kaj defendos la politikon de paca kunekzistado inter la ŝtatoj kun malsama sociordo. La Komunista Partio de Sovet-Unio alte portas la standardon de la paco kaj amikeco inter la popoloj. La venko de socialismo en la tuta mondo definitive forigos la kaŭzojn de ĉiuj militoj. La historia misio de la komunismo estas forigi la militojn kaj starigi eternan pacon sur la Tero.

La konstruado de la komunisma socio fariĝis senpera praktika tasko de la soveta popolo. Laŭgrada transformiĝo de la socialismo en komunismo estas objektiva bezono. Ĝi estas preparita de la tuta antaŭa disvolviĝo de la socialisma sistemo de Sovet-Unio.

La programo de KPSU estas programo ne nur de Sovet-Unio, ĝi estas

utila al ĉiuj socialismaj landoj, por ĉiuj progresemaj movadoj kaj homoj en la mondo. Ĝi estas programo pri proksima konstruado de la komunisma socio. Feliĉa estas la nuntempa soveta idaro kaj la idaro en ĉiuj socialismaj landoj, kiuj vivos en la kondiĉoj de la komunismo.

Ni, la bulgaraj esperantistoj ĝojas, ke ankaŭ ni per nia nacia kaj internacia laboro kontribuas al la afero de la paco kaj amikeco inter la popoloj, kontribuas por la afero de la komunisma socio.

N. NANOV

## ORDENE DEKORITA ESPERANTO-PIONIRO

Okaze de la 50-jara jubileo de nia kunlaboranto k-do Ivan Keremidĉiev — Esperov li estis distingita de la Parla-menta Prezidantaro per ordeno „Naŭa de Septembro 1944“ — III-a grado, pro lia aktiva kaj longjara socipolitika agado. Tio estas dua distingo de k-do Keremidĉiev. Unuan fojon li estis dekorita per ordeno pasintjare. K-do Keremidĉiev esias vicredaktoro de la fako „Partia Vivo“ en ĵurnalo „Rabotniĉesko delo“ („Laborista Afero“) — oficiala presorgano de la Bulgara Komunista Partio. En Esperanto-movado li okupas gvidantajn postenojn: membro de la Estraro de Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio kaj ĉefredaktoro de „Internacia Ĵurnalistto“ — oficiala presorgano de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio.

„Bulgara Esperantisto“ gratulas al k-do Keremidĉiev la novan altan distingon kaj tutkore bondeziras al li longan kaj feliĉan vivon, kaj fruktodonan agadon por paco kaj socialismo.

*Vivu la 44-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio! Sukceson al la sovetaĵ popoloj en la konstruado de komunismo!*

Krum Velkov

**KION POVAS IUFOJE PORTI EN SI  
MALNOVA KASKEDO**

La veturigistoj sidis sur malgranda aro da ŝtonoj en unu fosajo ĉe la vojo. Ŝajnis, ke ili ridardas al li. Salutsvinginte la manon, li sin direktis al ili malsupren laŭ la deklivo al la vilaĝo, kiu jam komencis vidiĝi. Post kelkaj minutoj li estis tie, facile rimarkis la figuron de Ignat kaj, haltinte en la mezo de la strato antaŭ la kafejo mem, li vokis lin. Kontrolinte tuj ĉu la homo lamas kaj certiginte ke vere tiu ĉi estas la persono, kiun li serĉas, li demetis la kaskedon de sur sia kapo, prenis el ĝia fundo falditan papereton kaj donis ĝin al li.

— Jen tio estas por vi. Ĉu oni vin nomas Ignat?

Ignat kapjesis. La rajdanto iomete klinis sin desur sia ĉevalo direkte al la lamulo, metis funelforme la manon sur sian buŝon kaj, mallaŭtiginte la tonon de sia voĉo ĝis flustrado, sekrete informis lin:

— Tio ĉi estas ordono al vi pri ribelo. Ĝi jam komenciĝis. En nia vilaĝo Maslovo ĝi eksplodis jam hieraŭ vespere. La domo de la komunumo troviĝas en niaj manoj, nun niaj kamaradoj batalas nur por konkuri la fervojstacion. Nu, mi ekiras tuj, sed ĝis morgaŭ supozeble mi povos denove veni ĉi tien. Mi estas interkomunikanto, memoru min!

Ignat ne urĝis malfaldi la papereton, sed restis senmova kaj rigardis kiel la ŝvitanta ĉevalo ree formalaperis laŭ la strato tien, de kie ĝi estis veninta, lasante post si tutan nubon da polvo. La koloro de la vizaĝo de Ignat estis ŝanĝiĝinta, kiam li eniris denove la kafejon. Tie li malfaldis la misteran papereton, kiu enhavis la ordonon, kaj tralegis sian adreson en la komenco,

skribitan maltrankvile per grandaj kaj neegalaj literoj. Sub la adreso, per la sama neegala skribmaniero, kvazaŭ oni apogis senpere sur la tero la paperfolion dum la skribado, sekvis informo al li, ke la revolucio jam estas proklamita kaj ke ĝia fajro furiozas tra la tuta lando. Ĉe la plej malsupra parto de la mallonga teksto sekvis ordono al ilia grupo en Borovo, ke ankaŭ ili devas konkuri la komunumejon, kunvoki la vilaĝanojn je mitingo kaj sciigi ilin pri la nova laborista-kamparana reĝimo de regado. „Vi ĉiuj prenu la armilojn kaj atendu la sekvontan instrukcion!“ — finiĝis la ordono, subskribita de iu komandanto de la revolucia regiono de Maslovo. Ignat ne koniŝ lin persone. Sed tio havis ja nenian signifon en tiu ĉi okazo, ĉar ĉe lia lasta vizito en la regiona urbo, oni sciigis lin, ke vilaĝo Maslovo estas komunista partia centro, al kiu apartenas Borovo kaj ankoraŭ kelkaj vilaĝoj.

El la romano „Vilaĝo Borovo“

Tradukis: Iv. SARAFOV

**LA GLORO**

Al Stepan Pavloviĉ Titov

La patron de la dua kosmonaŭto  
neniam vane tentis famo kria —  
vivante en modesto kaj mallaŭto,  
li loĝas en vilaĝo siberia.

Sed liaj pensoj flugas ĉirkaŭtere,  
kaj posedante lingvon de espero,  
li al la tuta mondo perletere  
esprimi povas sin sen ies pero.

Kvin kontinentoj lin hodiaŭ laŭdas,  
kvin kontinentoj ĝojas kaj aplaŭdas  
al la honesta, nobla kleriganto.

Ĉar li laboras, forgesante lacon,  
ĉar li instruas bonon, scion, pacon,  
la filon edukinte mondfluganto.

K. GUSEV,  
Moskvo



# H I M N O

## DE GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO

Kolektive tradukita de Lejpcigaj  
Esperantistoj

Leviĝintaj el ruinoj  
Kun vizaĝ' al la estont',  
Servu viajn ni destinojn,  
Germani', en unu front'.  
Venku ni mizerogermon,  
Kune ĝin detruos ni.  
Transpasinte la ekstermon  
Brilu pli ol iam sun'  
Super Germani'.

Pac-feliĉon ni deziras  
Al patrio de l'German'.  
Ĉiuj homoj pacsopiras,  
Al popoloj via man'.  
Cedos popol-malamiko,

Se vi fratas laŭ konsil'.  
Lumon pacan vi brilligu,  
Ke neniam plu patrin'  
Ploru pro la fil'.

Plugu ni, konstruu brave,  
Lernu, verku trans pasint',  
Fida je fort' propra grave  
Levas sin libera gent'.  
Junggermanoj, vol' plej bona  
Nestas de l'popol' en vi.  
Iĝos vi ekir' germana.  
Brilos pli ol iam sun'  
Super Germani'.

Joh. R. Becher

## P A T R I N O

Laŭ poemeto de Annie van der Horst

Patrino, ĉu ankoraŭ vi scias  
tiun tagon . . . jen naskiĝis infano, la via . . .  
sonis unua krieto, la ĝia . . .  
kiel muzik' en orelojn, magia . . .  
Patrino, ĉu ankoraŭ vi scias ?

Patrino, ĉu ankoraŭ vi scias  
tiun tagon . . . la buŝeto rideton provis . . .  
feliĉon en vian koron ĝi ŝovis .  
unuan fojon ĝi vin trovis . . .  
Patrino, ĉu ankoraŭ vi scias ?

Patrino, ĉu ankoraŭ vi scias,  
vian nomon ĝi unua formis . . .  
Vi, pri birdoj, pri floroj informis . . .  
Vortojn pri dolĉo de l' Viv' el vi ŝtormis . . .  
Patrino, ĉu ankoraŭ vi scias ?

Patrino, ĉu vi tion scias,  
ĝi dankas ekziston al fonto, al vi . . .  
Kaj . . . iam demandon sfarigas do ĝi:  
„Panjo! Por Paco . . . nu, kion ja faris vi?“  
Patrino, ĉu tion vi scias ?

Ĉu scias ankoraŭ, patrino:  
Vi gvidis unuajn paŝojn per amo . . .  
Kontraŭ malsan' vi batalis en flamo . . .  
Batalu do kontraŭ milita maŝino!  
Batalu por Paco!  
En nom' de l' infan' el propra la sino!

Libere tradukis:

J. Schoon



Ĥr. Smirnenski

### TEMPESTO EN BERLINO

Sub la ĉielo de glacia nokt'  
ekblovis ŝtorm' tempesta en Berlin'.  
La urbo brua kun kolera kri'  
gigante ekstariĝis, kaj kun fort'  
minac' popola tondris pli kaj pli.  
Kaj krion misprofetan turnovent'  
ekportis sur flugiloj dum moment'.

Kaj super la tilioj en obskur'  
ekblovis ĝi kaj en la nokta for'  
aperis apud ĉiu eta pord'  
en la malriĉa griza antaŭurb'.

Kaj ĉiu eta domo de Berlin'  
kaj jen malluma ĉiu sklavangul'  
deŝiris tuj de sia frosta brust'  
la propran filon kaj forsendis lin  
en la batalon por bruligi per  
sang' sia la fajregon de la lukt',  
ke li murдите en la finminut'  
heroo estu de l'liber'.

Spartak' al barikadoj vokas nun  
kaj tien iras batalantoj mil.  
Fatala flamas en okuloj bril'  
kaj paŝoj jam fordronas en mallum',  
kaj sub ĉifona soldata mantel'  
kaŝiĝis la martel' aŭ karaben'.  
Kaj firmapaŝe tra la malseren'  
heroe ili iras al la cel'.

Idar' humila de la brua urb'  
amasiginte en la fajra sfer'  
majesta pro heroa la afer'  
en la tempesto de l' batal — perturb',  
renkontas la kanajlojn firme tuj.  
Kaj bruligite de la flam' kaj fum'  
starigas ŝildon nevenkeblan nun.

Kaj ne ekmutas la herooj jam.  
Ŝrapnel' alflugas muĝe post ŝrapnel',  
ŝirigas la kurtenoj de l' malhel'  
kaj ŝprucas floroj de la flam'  
sur la tremanta urb' kaj citadel'.  
La sklavoj staras kiel firma mur',  
rok' ankaŭ esfas penso por liber'  
la konstruaĵoj — nestoj kie per  
standardoj flirtigitaj el purpur'  
la bluĉemizaj agloj klei ond'  
alvokas al la nova viv' kaj ord'  
al lum', libero kaj lazur'  
la tutan proletaron en la mond'.

Sed kun altern' en tondro kaj en flam'  
la aglaj nestoj falas en ruin'.

Kaj super ili vagas Mort' — kaj sin  
satigas per la malsatuloj jam.  
Per pezaj paŝoj marŝas en la urb'  
husaroj tra multnombra kadavrar',  
antaŭen ili iras jam sen bar',  
kun signo malhonora sur la brust'.

Kaj en Berlin' tra fumo sen konsol',  
de dom' al dom' portiĝas la inform',  
ke en la nokt' la Morto rabis for'  
gvidanton de la sklavoĵ kaj popol',  
kaj ĉar virin' heroa en malhel'  
formortis en la misprofeta sfer'  
kun la rideto de falanta stel'.

. . . Kaj ĉesis la tempest'. Finfestis jen  
la venkon sian malamlika band'  
svingante nigran flagon en la land'  
tra l' mok' de siaj ĝoĵoj kaj festen'.  
Sed klam en Berlino dum vesper'  
ektintas feste la glitveturil'  
kaj aĉaj ridoj de virinoj mil —  
en blua fum' giganto kvazaŭ — per  
rigard' fiksita al la stela ark',  
elkreskos kun kolera la ruĝfantom'  
kaj super urb' portiĝas tondra ond':  
.Ja malgraŭ ĉio, venkos vin Spartak'!'

Kolektive tradukis: At. Lakov,

Ĥr. Gorov—Ĥrima

### POPOLKANTO

Por kio mi renkontis vin, amato,  
por kio vi respondis al la am'?  
Ne sciis mi animan suferadon,  
ne brulus mia kor' en ama flam'.

Turmentas mian vi knabinan koron,  
por kio vi malfruas sen kompat'?  
Pro kio vane pasas tempo ora,  
pro kio vi ne venis jam, amat'?

Jen venas li sopire atendita,  
karesas min kaj kisas min sen ĉes',  
triumfas la animo konsolita,  
kaj koro mia kantas pro kares'!

El la rusa tradukis:  
S. Izmajlov



## PASIS KVINDEK JAROJ

(El la Historio de Esperanto-movado)

Junio de 1921. Nur antaŭnelonge en Rusio finiĝis la intercivitana milito. En la vasta lando ankoraŭ regis malsato, ekonomia malordo. La Soveta registaro, sub gvido de V. I. Lenin, komencis energie restarigi la ekonomion de la lando. Por aktivigi la rolon de la sovetlandaj esperantistoj en la rekonstruado de la lando kaj plifortigi la internaciajn rilatojn, oni decidis kunvoki la Unuan Tutrusian Kongreson de la Esperantistoj en Leningrado. En tiu ĉi afero, aktive helpis la esperantistaron Popola Komisario de Klerigado (komisaro Anatolij Lunaĉarskij). La Soveta registaro permesis al ĉiuj delegitoj senpage veturi al Leningrado kaj garantiis al ili senpagan restadon.

Mi estis tiam 17-jara junulo kaj laboris en urbo Vitebsk kiel sekretario de la Urba Organizaĵo de Komunista Junularo. Inter la delegitoj de nia urbo estis ankaŭ k-doĵ Ŝaber (redaktoro de Tutrusia junulara Esperanto-revuo), Vertinskaja, Golikova kaj Fajnberg. Mi memoras, ke fervojistoj de nia urbo disponigis al la delegitoj apartan kupeon en Internacia Vagono. Sur la pordo ni pendigis ruĝan flageton kun verda stelo. Niaj delegitoj decidis interparoli nur esperantlingve. Aliaj pasaĝeroj en nia vagonaro multe diskutis, kiuj ni estis — ĉu hispanoj, ĉu italoj. Unu demandis nin germanlingve pri tio. Mi respondis: „Ni estas esperantistoj“. La delegitoj alvenis Leningradon. En la ejo de la leningrada societo „Espero“ ni renkontis veteranojn de la Esperanto-movado: Devjatnin, Drezen, Valentinov, poeto Deŝkin, Ĉaĉe.

La unua kunsido. Pli ol 200 delegitoj de Unua Tutrusia Kongreso unuanime kantis la tiaman sovetan himnon „La Internacio“.

La kongresanoj komencis diskuti varmege pri la rolo de la esperantistoj en la konstruado de la soveta ŝtato. Kvankam la kongreso okazis tri jarojn kaj ok monatojn post kiam okazis la Granda Oktobra Revolucio, tamen ne ĉiuj esperantistoj komprenis, ke Esperanto estas ilo por fortiki kaj kreskigi la internacian proletan solidarecon. Bedaŭrinde, kelkiuj delegitoj diris, ke Esperanto-movado devas esti neŭtrala, sed la pli granda kvanto de la kongresanoj decidis, ke ni devas utiligi Esperanto-movadon por plifortigo de la Soveta Respubliko. La delegitoj varmege parolis, ke esperantistoj devas helpi la plivastigon de la internaciaj interrilatoj de la laboristaro en la tuta mondo.

Kiam oni finis la diskutadon la kongresanoj unuanime leviĝis kaj kantis la Esperanto-himnon. Larmoj aperis en la okuloj de multaj delegitoj. Multaj komprenis ke „en la mondon venis nova sento, tra la mondo iras forta voko“.

Antaŭ mi kuŝas la fotografajo de tiu ĉi kongreso. Multaj kongresanoj nun jam estas for, sed la Esperanto-movado kreskas. Venis novaj entuziasmoj de la amata internacia lingvo.

Post la Unua Tutrusia Kongreso la esperantistaj-komunistaj delegitoj kaj alilandaj gastoj de la kongreso decidis kunvoki konferencon de komunistaj esperantistoj. La konferenco daŭris unu tagon.

Pasis 40 jaroj. Bedaŭrinde mi jam multon forgesis — kaj precipe pri tio — kio okazis en la kongreso kaj la konferenco. La Unua Kongreso de la Sovetlandaj Esperantistoj treege helpis la kreskigon de la Esperanto-movado.

Efim FLEJS

## REKAPITULACIO DE LA ELEMENTOJ DE ESPERANTA GRAMATIKO

At. D. Atanasov — ADA

### ARTIKOLO

La artikolo konkretigas kaj individuigas; ĝi montras ne *kiun ajn* el kelkaj, sed precize difinitan, sciatan.

Substantivo, uzita sen artikolo, estas proksima laŭ senco al IU — (kiu ajn, kelka, kelkaj).

Donu al mi krajonon. (Kiun ajn el la kraĵonoj, ne gravas kiun precize).

Donu al mi *la* krajonon. (Ni jam scias pri kiu kraĵono ĝuste temas).

Mi bezonas adreson de instruisto. (De kiu ajn instruisto).

Mi bezonas *la* adreson de *la* instruisto (Ni scias precize pri kiu instruisto nome temas).

*Egale direblaj:*

Rozo estas floro = La rozo estas floro (Rozo ĝenerale, rozo kiel speco de vegetaĵo ĉiu rozo, kiu ajn rozo estas floro).

Rozo estas simbolo de la amo      La rozo estas simbolo de la amo.

### GRADOJ DE KOMPARO de adjektivoj kaj de adverboj

*Pli. . . ol. . .* (Pli juna ol mi, pli rapide ol birdo).

*Plej. . . el. . .* (Plej facila el ĉiuj lingvoj, plej diligente el ĉiuj).

*Malpli. . . ol. . ., malplej. . . el. . .*

Noto. — „Malpli alta ol li“ signifas, ke estas komparataj du altaj personoj, pri neniu el kiuj oni povus diri „malalta“; el la du altaj tamen la unu estas iom pli alta ol la alia, do la alia, estante ankaŭ alta, estas *malpli* alta. Same ĉe „malplej granda“ estas komparataj grandaj objektoj aŭ personoj, sed inter ĉiuj unu ne estas tiel granda kiel la ceteraj.

*Komparo de egalaj aĵoj:* tiel. . . kiel. . ., same. . . kiel. . . (Johano estas tiel granda kiel Petro, same granda kiel Petro; Johano kaj Petro estas egale grandaj).

### ADVERBO

Ĉiu adverbo povas esti anstataŭata per vortkomplekso — prepozicio kun substantivo:

rapide — laŭ rapida maniero.

laŭte — kun (per) laŭta voĉo, sono.

supre — sur la supro, sur (en) la supra parto.

hejme — en la hejmo.

nokte — dum la nokto.

somere — en (dum) somero.

multe — en multa kvanto, en granda (alta) grado.

Adverboj nederivitaj de radikoj: kun finaĵo *-aŭ* (hodiaŭ, morgaŭ, preskaŭ, ktp.) kaj kelkaj aliaj: nur, tre, tro. El ili povas esti formataj aliaj gramatikaj kategorioj per aldono de respektivaj finaĵoj: hodiaŭa, morgaŭa, nura, ktp.

### NUMERALOJ

*Nombraj:* unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil.

11 = dek + unu = dek unu.

20 = du × dek = dudek.

21 = du × dek + unu = dudek unu.

Miliono.

Noto. — 1. La nombraj numeraloj neniam ricevas akuzativan finaĵon: Mi havas DU librojn (ne: DUN librojn!).

2. La numeralo UNU povas havi multnombran finaĵon: Unuj homoj. Unuj el ni legas laŭte.

3. MILIONO estas nur en substantiva formo; ne ekzistas numeralo MILION (oni ne povas diri DUMILION kiel oni diras ducent, dumil; la korekta diro estas DU MILIONOJ; ankaŭ ne: „La urbo havas milion loĝantojn“ kiel oni diras „mil loĝantojn“, sed: „La urbo havas milionon da loĝantoj, du, tri, ktp milionojn da loĝantoj“).

*Ordaj* estas formataj per aldono de la adjektiva finaĵo -a al la nombraj numeraloj; havas karakteron de adjektivoj kaj povas ricevi iliajn formojn: -an, -aj, -ajn; unua, dua, tria, ktp.

*Adverboj* estas formataj per aldono de la adverba finaĵo -e al la nombraj numeraloj; montras la ordon, laŭ kiu okazas aŭ estas farata io: unue, due, trie, ktp.

*Substantivoj* estas formataj per aldono de la substantiva finaĵo -o al la nombraj numeraloj: unuo, duo, trio, ktp.

La prepozicio DA ligas tiujn substantivajn numeralojn kun aliaj substantivoj, al kiuj ili rilatas: mil volumoj = milo DA volumoj; dekdu kraĵonoj = dekduono da kraĵonoj.

La sama prepozicio servas por ligi vorton, kiu esprimas kvanton aŭ mezuron kun la substantivo, kiu montras de kiu materio estas tiu ĉi kvanto aŭ mezuro: *Kiom da esperantistoj* legas la gazeton „Bulgara Esperantisto? — Tri mil esperantistoj — aŭ — Tri miloj da esperantistoj. Kelkaj centoj da esperantistoj. *Kiom da abonantoj* havas la gazeto? (Tie ĉi KIOM estas rekta komplemento, sed ne havas la akuzativan finaĵon -n, ankaŭ la substantivo *abonantoj* ne havas la finaĵon -n, ĉar ĝin antaŭiras prepozicio DA, kaj laŭ ĝenerala regulo substantivoj post prepozicio restas en la ĝenerala kazo, kiu finiĝas per -o, -oj).

La prepozicio DA ligas ankaŭ la adverbojn, kiuj montras kvanton aŭ mezuron, kun substantivoj: multa mono = multe da mono; kelkaj pomoj = kelke da pomoj.

Same:

Glaso da akvo. Amaso da libroj.

## PRONOMOJ

POSEDA, kiam akompanas substantivon, estas uzata sen artikolo; kiam ĝi estas memstara (efektiva pronomo — anstataŭanto de nomo, de substantivo), estas uzata kun artikolo.

*Mia kraĵono* estas nigra, *la via* estas ruĝa.

*Nia domo* estas malgranda, *la ilia* estas pli granda.

RESENDA: *si, sin* (kaj la respektiva poseda: *sia*).

*Nota.* — 1. La resenda pronomo estas aparte klarigenda al okcidenteŭropanoj, kiuj ofte uzas, ekz.: *sia patro* anstataŭ *lia patro* (si, sia, ne povas esti subjekto). Kontraŭe, la slavojn oni devas atentigi, ke tiu ĉi pronomo ne estas uzbla por la unua kaj dua personoj; la ĝenerala uzo de la resenda pronomo por tiuj personoj en la slavaj lingvoj logas iam novajn esperantistojn en la slavaj landoj paroli „Mi vidas sin“.

2. Atentigu la lernantojn pri la kazo de reciproke ĉe la uzo de la resenda pronomo (kiam ĝi signifas ne *sin mem*, sed *unu la alian, reciproke*): Ili ofte renkontas sin. Ili neniam vidis sin (Respektive la kazojn: Ni amas nin. Ni renkontas nin).

PERSONA NEDIFINITA: Oni (Oni ĉiras, oni pensas).

## EKZEMPLOJ KAJ TIPAJ FRAZOJ

PLI . . . OL . . . : Pli bone pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero.

-A NUMERALOJ: Unua venis, unua prenis. Unua paŝo iron ĉirektas.

-E NUMERALOJ: Unue venis, unue prenis.

-O NUMERALOJ: Deko da pekoj, deko da punoj.

KIOM: Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj. Kiom da kapoj, tiom da opinioj.

SI: Li vidas en la spegulo sin kaj lin. Multaj esperantistoj renkontos sin en la kongreso.

ONI: Al la buŝo de „oni“ neniu povas ordoni.

## EKZERCOJ

1. — *Kompletigu per lin, sin, ŝin, ĝin la sekvantajn frazojn:*

Li lavas. Li amas. . Ŝi kombas. . Ili levas. Kiu estimas. ., tiu ne entreprenos tian agon.

2. — *Kompletigu la sekvantajn frazojn.*

Mi prenas mian libron. Vi prenas. . libron, kaj li prenas la. . .

Ni vidis. en la spegulo.

Ni serĉos. ĉe la angulo de la strato. Ili trovos. . . en la teatro.

(Daŭrigota)



## 17-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN WOKINGHAM

Granda scivolemo kaptis min, kiam la blankaj rokoj de Dover elnaĝis el la griza akvo de la Norda Maro kaj mi venkis la lacigon de la longa veturado por observi la nekonatan ĉirkaŭaĵon. Fakte antaŭ mi estis nekonata lando, en multaj rilatoj diferencanta de la kontinento: lando kie ofte la tradicio ludas pli grandan rolon ol la racio; lando de strangaj mezura kaj mona sistemoj; lando kie la razado kun via „kontinenta“ elektra razilo estas vera problemo, pro la specialaj anglaj kontaktiloj; sed ankaŭ lando, kies popolo same kiel ĉiuj aliaj sopiras al paco.

Post plenumo de la pasportaj kaj doganaj formalajoj, dum kiuj mia ruĝa pasporto larĝe malfermis la okulojn de la oficistoj, mi jam sidis en la vagonaro al Londono.

Autobuso transportis parton de la brua juna kongresanaro al la kongresejo — knaba lernejo apud urbeto Wokingham, situanta meze de granda parko kaj inter du drinkejoj. La kongresa programo tamen estis tiom streĉa kaj la angla biero tiom nekonforma al nia „kontinenta“ gusto, ke mi persone dubas ĉu multaj profitis de tiu situo.

Spirito de amikeco regis en la kongreso, kiun partoprenis pli ol 100 gejunuloj el 14 landoj. Multaj kontaktoj kaj intramikigoj efektiviĝis jam dum la UK en Harrogate kaj ŝajne la okazigo de la junulara kongreso post la Universala Kongreso helpas al la pli sukcesa evoluo de la kongresaj laboroj. Al la kutimaj aranĝoj ĉi-jare estis aldonitaj la diskutaj grupoj kaj unu belarta vespero. La diskutaj grupoj vekis grandan intereson, ja la junularo interesiĝas pri la problemoj de la nuntempa mondo kaj amas diskuti pri ili.

La diskutado pri la temo: „Britujo kaj la komuna merkato“, gvidata de John Wels devis analizi la konsekvencojn por la angla ekonomio rezulte de ĝia aliĝo al la komuna merkato. La diskutado tamen deflankiĝis al la nuntempa situacio kaj nete montris, ke la komuna merkato jam nun havas siajn akrajn problemojn. La eventuala aliĝo de Britujo ankoraŭ komplikiĝos ilin.

Dum la diskutado pri la proceso Eichmann, gvidata de H. Tonkin, oni substrekis, ke la okazigo de la proceso estas utila por vekigi multajn forgesintojn pri la Dua Mondmilito kaj pri la teruraj krimoj de la naziismo.

La diskutado pri la situacio de la sciencisto en la nuntempa socio, gvidata de C. Minnaja montris, ke pro la socia ordo en la socialismaj landoj, tie ekzistas aparte favoraj kondiĉoj por disvolvo de la scienca esplorado,

kiam en multaj kapitalismaj landoj tio dependas de la bonvolo kaj intereso de diversaj privataj kompanioj.

La iniciato de LKK en Wokingham por okazigo de la diskutaj grupoj estas salutinda kaj imitinda, tamen estonte la pritraktotaj temoj devas esti frue anoncigitaj. Tio nur helpos al la pli rezultodona diskutado.

Dum la kongresa semajno okazis ankaŭ kelkaj prelegoj de elstaraj esperantistoj kaj tute speciale menciindaj estas tiuj de prof. I. Lapenna pri la agado de CED kaj de W. Auld pri la Esperanta literaturo.

La lingva nivelo de la partoprenantoj estis sufiĉe alta kaj eĉ niaj anglaj amikoj ne havis la teruran akcenton de siaj grandaĝaj samlandanoj. La oratoran konkurson en Wokingham gajnis V. Sadler (Britujo) parolante pri la temo „Arboj“. Li lerte akcentis sur la formo de sia parolado, nebuligante ĝian enhavon. La duan premion ricevis E. Weide (Germanujo) parolante pri la temo „Ĉu la junularo bezonas esii organizita?“

La juna esperantista popolo amuziĝis dum la internacia balo, la subĉiela vespero kaj... dum ĉiuj aliaj vesperoj, kiam la malluma parko estis multe pli aloga ol la litoj. Dum la balo okazis ankaŭ la frue anoncita sekreta konkurso Doktoro Mizantropo. Kia estis la surprizo de la ĉeestantoj kaj precipre de la knabinoj, antaŭe fiksitaj sur sia dorso pape-ran numeron, kiam oni anoncis ke temas pri elekto de „Miss Esperanto 1961“. „Kompetenta“ komisiono, post sekreta voĉdonado de ĉiuj viroj, deklaris sian decidon favore al la franca studentino Marilyn Brieussel.

Same kiel la UK en Harrogate ampleksis multajn belartajn programojn, ankaŭ la TEJO-kongreso havis sian „belartan vesperon“. Ni aŭdis poëm-deklamadon (kiel kutime la enhavo de multaj el la poëmoj restis nekomprenebla), plenumon de fama angla pianisto — Frank Merrick kaj ankaŭ kantadon de iu pseŭdokantistino, kiu obstine kaptadis ĉiun okazon, ĉu en Harrogate, ĉu en Wokingham, por enuigi la ĉeestaron.

Niaj britaj mastroj organizis interesajn ekskursojn al la palaco de Windsor, al la universitata urbo Oxford kaj al Londono, parte per aŭtobusoj, parte per ŝipo. La kongresanoj vizitis ankaŭ modernan biskvitfabrikon en Reading. Ŝajne tamen la firmao faris malbonan reklamon por sia produktaĵo, ĉar post la avida biskvitmanĝegado en la fabriko, ĉiuj ne plu deziris vidi biskvitojn en sia buŝo.

Dum la kongreso okazis ankaŭ multaj kunsidoj de la Komitato de TEJO, kunsidoj de diversaj komisionoj (eĉ dum la ekskurso sur la ŝipo), diskutaj grupoj por spertointerŝanĝo inter la landaj TEJO-sekcioj ktp. Estis elektita nova Estraro de TEJO nome: G. Becker — prezidanto, N. Minnaja — vicprezidanto kaj

estrarano pri korespondaj servoj, S. Simeonov — vicprezidanto kaj estrarano pri informado, M. Pietrzak — ĝenerala sekretario, H. Tonkin — kasisto, H. Reiter — redaktoro de „La Juna Vivo“, N. Nikolov — estrarano pri neesperantistaj renkontiĝoj kaj S. Zlatnar — estrarano pri turismo kaj junularaj delegitoj.

Oni akceptis regularon pri la korespondaj servoj kaj regularon pri la informa agado (laŭ nia propono).

Oni diskutis la fondon de pluraj novaj landaj sekcioj kaj restarigo de iam ekzistintaj en Francio, Belgio, Norvegio, Nederlando, Danlando ktp. Viglajn diskutojn provokis la problemo pri partopreno de TEJO en la Festivalo en Helsinko kaj fine oni decidis sendi oficialan reprezentanton al la esperantistaj aranĝoj tie.

En la lasta kongresa tago okazis la ĝenerala kunveno de TEJO, kiam oni sciigis la decidojn de la Komitato kaj akceptis kongresan rezolucion atentigante al la landaj sek-

cioj kaj aliaj Esp.-organizaĵoj pri la bezono de pli aktiva partopreno en la neesperantistaj junularaj aranĝoj kaj tie propagandi la larĝan aplikadon de Esperanto en la internaciaj rilatoj de la junularo.

Alvenas la solena kaj iom trista, pro la baldaŭa disiĝo, ceremonio de la fermo. Dankvortoj al la simpatia LKK, gvidata de H. Tonkin, respondo de la lasta kaj fine nia kara prezidanto kun emocigita voĉo kaj kun aparta akcento sur ĉiu silabo deklaras la 17-an IJK de TEJO MAL... fermita, sub la tondra aplaŭdego de la gajigita juna publiko. Tiamaniere li aldonis ankoraŭ kelkajn liniojn al la prikongresaj raportoj en ĉiuj Esp. gazetoj.

Ĝis revido en la venonta kongreso, kaj ĝis tiam, dank al la notkajeroj plenigitaj kun adresoj de novaj amikoj, miloj da leteroj flugos de loko al loko plifirmigante la amikecon kaj helpante por la interkompreno de la diversnacia junularo.

**Simeon Simeonov**

## ORGANIZA VIVO

### LA SOCIETOJ REVIGLIĜIS

Pasis jam la feriaj someraj tagoj. Ekestis denove sezono por kultura agado. La esperantistoj streĉas siajn vicojn, faras planojn per la aŭtuna agado, preparas la komencon de la lernojaro.

La asocia sekretario Violin Oljanov en la komenco de septembro vizitis la societojn en Razgrad, Kubrat, Isperih kaj Varna. Ĉie li konatigis al la membraro la decidojn de la juna plenkunsido de CK de BEA, kaj instrukciis la societojn pri la plenumendaj taskoj. Ĉie oni unuanime aprobis la decidojn de la plenkunsido.

Kiel dua punkto de tiuj kunvenoj staris la akcepto de planoj por la nova lernojaro. Oni difinis lokojn por malfermo de kursoj kaj la kursgvidantojn. La kursoj komenciĝos en la komenco de oktobro. Antaŭ tio en ĉiuj tiuj urboj estas organizota propaganda semajno. La entuziasmo estas granda kaj esperiga. Eĉ la societo en Isperih, kiu dum la lasta jaro stagnis, sukcesis kunveni 11 personojn. Oni esprimis opinion, ke la vizito de la sekretario de CK de BEA (unuan fojon vizitis la societon membro de CK) influos tre favore al la estonta agado. Kune kun la vicprezidanto kaj la sekretario de la loka societo k-do Oljanov vizitis la Urban Komitaton de BKP, la Urban Komitaton de la Komsomolo kaj la direktoron de la gimnazio, kun kiuj li priparolis helpon al la esperantista societo. La gimnazia direktoro konsentis, ke oni enkonduku Esperanton en la lernantajn rondojn.

En Varna la amasan kunvenon ĉeestis Esperanto-amikoj el Pollando, Aŭstrio, Okcidenta Germanio, kiuj salutis la kunvenon.

Ni esperas, ke baldaŭ ni ricevos sciigojn pri la unuaj rezultoj de la revigligo.

**SOFIO.** La ĉiusemajnaj kunvenoj de Esperantista Societo „Maksim Gorkij“ okazas ĵaŭde ek de la 19,30 h. en la klubejo sur bulv. Dimitar Blagoev 2. Pli ol 100 geesperantistoj regule partoprenas la kunvenojn. Ili atente aŭskultas la bone preparitajn programojn kaj aktive partoprenas en la diskutoj. La 7-an de septembro k. j. k-do N. Nanov prelegis pri la unua parto de projekto por Programo de KPSU. La 14-an de septembro k-do Atanas Lakov prelegis pri la dua parto de projekto por Programo de KPSU. La 21-an de septembro k-do T. Uŝanski rakontis pri la konstruado de la granda metalurgia uzino en v. Kremikovci, apud Sofio kaj k-dino E. Kaminska raportis pri siaj travivaĵoj en faŝista koncentrejo Osviencim. Le 28-an de septembro k-do Nikola Aleksiev, vicprezidanto de la ŝtata Komitato por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando parolis pri „Germana problemoj kaj la monda paco“. La kunveno voĉdone aprobis tekston de telegramo al la Packomitato en Germana Demokrata Respubliko.

**Spartak Petkov**

### MONTODOMO „ESPERANTO“

\* Departamento „Lesoparkove“ preparis montro-tabelojn pri nia montodomo. Ilin oni fiksis apud la kruvojoj en la ĉirkauaĵo de la montodomo.



\* Por fari konstanta tegmento de la montodomo estas necesaj 150 kv. metroj da eternitaj platoj. Kiu povas helpi por ke ni aĉetu ilin?

\* Por pli vasta diskonigo de la konstruata montodomo inter la esperantistaro kaj por mobilizo de ties klopodoj por ĝia finkonstruo estas eldonita dukolora poŝtkarto. Ĝin desegnis la esperantistino-arkitektino Jordanka Marinova. La poŝtkarton ni sendos al ĉiuj kiuj iamaniere helpis la konstruadon de la montodomo.

\* Novaj kontribuanto

Studenta E-to-Societo	Sofia	150 lv
Krâstju Karucin	"	100 "
Donĉo Hitrov	"	60 "
Georgi Petrov	"	10 "
D-ro Dimo Dimov	"	40 "
Petâr Vlasev	Levskigrad	10 "
Entute:		370 lv.

Ni kore dankas al ĉiuj geesperantistoj, kiuj komprenante la gravecon de la starigo de montodomo por nia movado daŭre kontribuas por ĝia finkonstruo.

## LA KONSTRUA KOMITATO



**Laborbrigado de esperantistoj el Sofio helpas al la agrikultura kooperativo en vilaĝo Ĉepinci, apud Sofio**

## NOVA SOCIETO

En unu el siaj lastaj kunsidoj CK de BEA decidis konfirmi la fondon de nova Esperanto-societo — de la sofiaj aŭtotransportistoj. La entuziasmo inter niaj novaj agantoj estas granda. La kampo por agado de la nova societo estas vasta. Gratulante niajn samcelanojn ni esperas, ke ili faros baldaŭ sian societon modela. Tio estas la sesa Esperanto-societo en nia ĉefurbo kaj 127-a en la lando. Ni deziras sukceson.

**KUBRAT.** Esperanto-societo „Progreso“ komencis streĉan laboron por prepari sukcesplenan lernojaron. Por la celo la estraro dum sia kunsido de 24-a de aŭgusto aprobis specialan planon laŭ kiu oni antaŭvidas la fundamentajn taskojn.

1. Foje dum la semajno (merkrede) ni uzas la lokan radion por prelegoj. Ĝis nun oni prelegis la temojn: „Internacia lingvo hodiaŭ“, „Esperanto en la vivo“, „Esperanto en la lernejoj“ kaj parolado de nia sveda gasto Karl Kvist kun bulgara traduko.

2. Arango de konstanta vitrino en la centro de la urbo kaj propagandaj anguloj en lernejoj kaj entreprenoj.

3. En la tuta urbo estas disgluitaj alvokoj kaj scilgoj kun propagandaj materialoj por la komenco de E-kursoj.

4. En la nomo de E-societo, kunlabore kun la loka Kulturdomo nia estrara membro d-ro Iv. Kirĉev prelegos en la kulturdomo pri la temo „Kibernetiko helpe al la progreso“.

Ekde la 1-a de oktobro funkcios tri kursoj — por civitanoj, gelernantoj kaj por progresintoj.

Societo „Progreso“ havis karajn gastojn: la sveda esperantisto kaj MEM-estrarano Karl Kvist kun sia kamaradino Rosa Wendl. Tuj post la ricevo de la scilgo por illa alveno en Varna du aŭtomobiloj per verdaj flagetoj kun esperantistoj de Kubrat kaj Razgrad direktiĝis al la somerrestadejo „Druĵba“ por renkonti la gastojn. Illa gastado estis organizita de Distrikta Komitato de BKP en Razgrad kune kun la Urba Komitato en Kubrat. Alveninte en Razgrad — 29-an de aŭgusto, la gastoj vizitis la uzinon por antibiotikoj kaj la vitra uzino, akceptitaj tre gasteme de la ĉefoj kaj la laboristoj en tiuj entreprenoj. La klarigoj okazis en Esperanto. Posttagmeze la gastoj alvenis en Kubrat kore akceptitaj en la Urba Komitato de BKP kaj la tuta urbanaro. Post la vizito en la ŝtata agrikultura bieno kaj post la kora renkontiĝo kun la loka esperantistaro en la klubejo de la societo por la gastoj estis aranĝita oficiala renkonto en la Partia Kabineto kun la estraranoj de multaj amasaj organizoj, aktivuloj, sindikatanoj, junular-gvidantoj. La saman vesperon kvar aŭtomobiloj direktiĝis al Sevar-vilaĝo kun turka loĝantaro, kie la gastoj estis akceptitaj de la prezidanto de la vilaĝa konsilantaro Ĥ. Merdanov — ankaŭ esperantisto. La gastoj vizitis vinberejon de la loka kooperativo, kie ili vidis la riĉan vinberan rikolton. Vespere, turka amatora ensemblo prezentis distran kaj tre interesan programon. Post la reveno en Kubrat okazis adiaŭa vespero en restoracio „Moskvo“ kun multe da gajeco kaj bonhumoro.

Per la gastoj ni montris praktike al la urbanaro la uzeblecon de Esperanto. Tio estas tre efika propagando kaj ĝi certe kontribuos por la sukcesa komenco kaj fino de la lernjaro.

**Ĥr. Dimitrov**



**JAMBOL.** La 18-an de aŭgusto 1961 okazis kunsido de la estraro de Esperanto-societo „Maksim Gorkij“, en kiu partoprenis ankaŭ la membro de CK de BEA Georgi Dimov el Varna. La prezidanto Dimo Trudoljubov informis la estraron pri la estonta agado de la societo.

Interalie li diris, ke la 17-an de aŭgusto pere de la loka radioservo oni malfermis la propagandan monaton en nia urbo. La prezidanto Dimo Trudoljubov parolis pri la internacia lingvo en servo de paco kaj tutmonda amikeco. Kamaradino Zlatka Stoilova deklamis la faman versaĵon „La vojo“ de L. L. Zamenhof. La disaŭdigo vekis grandan intereson kaj multaj, precipe gejunuloj, anoncis sian deziron partopreni en la kurso. Oni projektis malfermi dekdu kursojn dum la venonta lernjaro. La kursgvidantoj estos plejparte la novaj diplomitaj instruantoj de la tendaro en Drujevo.

En la vicoj de la lokaj geesperantistoj regas granda entuziasmo.

Je la fino de la kunsido k-do G. Dimov parolis pri siaj spertoj en Varno kaj donis valorajn konsilojn al la kursgvidantoj.

Nia societo estas en konkurado kun la Esperanto-Societo „Nigra Maro“ en Burgas kaj ni esperas, ke ni gajnos la konkuradon. Ni amase partoprenis la 35-an kongreson en Burgas. Dank' al la valora helpo de la Partio kaj la lokaj aŭtoritatoj ni baldaŭ havos propran klubejon.

La 27-an de aŭgusto 1961, dimanĉe la membroj de la Esperanto-societo „Maksim Gorkij“ en Jambol, havis labortagon en terkultura laborkooprativo en vilaĝo Kabile, helpante en la rikoltado de blujaj prunoj, speco „Kjustendilski“ kaj pomoj — speco „Zlatna parmena“. Tiu ĉi manifestiĝo okazis je la honoro de Naŭa de septembro, festotago de la liberiĝo, por kiu kontribuis ankaŭ la esperantistaj kontraŭfaŝistoj per sia aktiva agado.

Post la tagmeza ripozo okazis mallonga kunveno de la kooperativanoj kaj de la esperantistoj. La prezidanto de la Esperanto-societo „Maksim Gorkij“ Dimo Trudoljubov parolis pri la internacia situacio, kaj tralegis la ĉefartikolo „La esperantistoj en la unuajn vicojn“ el revuo „Bulgara esperantisto“.

Kun granda fervoro laboris ĉiuj esperantistoj kune kun la junaj adeptoj de la internacia lingvo Esperanto: Petja Kraĉeva, Malĉo Vâlĉev, Zlatka Stoilova, Zlatka Sabeva, Radka Ivanova, Atanaska Genĉeva, Katja kaj Dora Panĉevi kaj aliaj, partoprenis la veteranaj esperantistoj: Bojan Kuŝev, Ivan Anastasov kaj David Hazmonaj.

Je la fino la brigadestro Ivan Penkov dankis al la jambolaj geesperantistoj invitante ilin pli ofte viziti la vilaĝon.

Helpante al la agrikultura kooperativo samtempe ni plej efike propagandis Esperanton inter la vilaĝanoj.

Je la 9-a de Septembro urbo Jambol vekigis en festa vestaĵo. Banita en sunbriloj la ĉielo vibras kiel silko. La stratoj dronas en verdaĵo, flirtas arbaro da ruĝaj, naciaj kaj blujaj standardoj. La vizaĝoj brilas en tiu ĉi tago, kaj ĉiu koro estas plena je ĝojo kaj amo, kun neretenebla impulso.

Hodiaŭ estas la Naŭa de Septembro — nia nacia festo.

Ekde la deka horo kaj duono antaŭ la tribuno komencis pasi la kolonoj de lernantaj junuloj, de la laboristaj kolektivoj en uzinoj kaj fabrikoj. Legeblaj estas sloganoj: „Floru, respubliko popola sub la suno de la socialismo“. „Atente maldormas ni ĉe la limoj de Bulgario“, „La batalo por paco estas nia sankta afero“ kaj aliaj.

Kune kun la kolonoj de la laboristoj, oficistoj kaj lernantoj kun viglaj paŝoj pasas antaŭ la tribuno la kolono de la jambolaj esperantistoj. Super iliaj kapoj vidigas sloganoj: Vivu Esperanto. Per Esperanto por mondpaco. Preterpasante la tribuon ili silabumis: Esperantistoj estas por la paco; Vivu naŭa de septembro. Responde la laŭparolilo disaŭdigis: „Batalan saluton al la esperantistoj, batalantoj por paco kaj kompreniĝo inter la popoloj“, „La internacia lingvo Esperanto ludas gravan rolon en la internacia kultura komunikado“, „Vivu la bulgara esperantista movado, kiu en la batalo kontraŭ la faŝismo donis ka-



**Petja Kraĉeva kaj Katja Panĉeva helpas al la agrikultura kooperativo rikoltante pomojn**



### Jambolaj esperantistoj en la geurbana manifestacio okaze de la nacia festo — la 9-a de Septembro

rajn viktimojn — Anĝelo, David Sasonov, Todor Sofroniev, kaj aliaj". La esperantistaj kolonoj estis aplaudataj de la aŭtoritatoj kaj la urbanaro. Per tio la esperantistoj montris, ke ili estas nedisigebla ero de la korpo kaj sango de nia liberama, laborema kaj sciencama popolo.

La triumfa manifestacio forsilentigis, sed la laborulaj amasoj enportas la ĝojo en siajn domojn. En familia rondo kun amikoj kaj parencoj ili tintigas la glasojn ĉe plena manĝotablo.

**Dimo Trudoljubov**

**ST. DIMITROV.** Je la 25-a de junio okazis kunveno kun prelego de k-do. Stoil Kolarov pri la impresoj de la ekskurso ĝis la soveta urbo Odeso, kiun vizitis kvin membroj de nia societo. La prelego estis tre interesa. Ankaŭ rakontis pri ĝi la aliaj ĉeestintoj: Banov, Ignatov kaj Kalĉev. Kun intereso oni trarigardis la fotojn.

La 2-an de aŭgusto okazis kunveno kun raporto: „Por ideologia stabligo de la Bulgara Esperantista Asocio“. Prenis la parolon gekamaradoj: B. Drenski, Banov, Iv. Smokov, Veliĉkov, Tomanov, Ignatov, Smokova. Ĉiuj aprobis la novan agmanieron de BEA kaj faris rekomendojn pri la agado kaj propagando de la lingvo. K-doj Benov kaj Dombrovski rakontis pri la batalo de la lokaj laboristaj esperantistoj dum 1932--33. Oni memorigis pri la karaj viktimoj en la batalo kontraŭ la faŝismo.

La kunveno decidis, ke oni donacu unu vortaron al la sindona kamarado Petăr Angelov, kiu preparis denove murŝranketon por ekspozicio kaj propagando. Kun granda entuziasmo oni disigis ĉivespere.

**Iv. Dombrovski**

**BURGAS.** Grupo da polaj samideanoj estis kore akceptita de la lokaj esperantistoj. Kune ni faris ekskurson al la historia insulo „Bolŝevik“ Tie la ekskursantoj ekkonis la heroojn de 43 ekzilitaj komunistoj, sukcesintaj forkuri al Turkio.

En la bele ornamita klubejo la gvidanto de la pola drupo prof. Toĉinski parolis antaŭ 40 geesperantistoj pri „Gdansk dum la Dua Mondmilito“. La prelego estis ege interesa. Tiu ĉi kunveno estis manifestiĝo de la pola-bulgara amikeco.

**Navart Nigoŝojan**

**Noto de la Redakcio.** Tiaj prelegoj havantaj ĝeneralan intereson devas okazi publike kun traduko en bulgaran lingvon. Montrante la praktikan uzeblecon de Esperanto ni faras la plej efikan propagandon, kiu estas multe pli valora ol la ĝeneralaj artikoloj en la gazetoj.

### KRĀSTJU GEORGIEV APOSTOLOV

La 29-an de aŭgusto 1961 forpasis en Asenovgrad la membro de societo „David Sasonov“ kaj lektoro de Esperanto Krāstju Georgiev Apostolov.

Li naskiĝis la 10-an de januaro 1902 en Asenovgrad en laborista familio.

Kr. Georgiev fariĝis esperantisto en 1924, lernante la lingvon aŭtodidakte. Li perfektigis en la lingvo per la helpo de David Sasonov kaj Ĥ. Marinov Gorov. Ili, la triopo, ĵuris paroli nur en Esperanto, kaj tiamaniere perfektigis en la lingvo kaj ili plenumis strikte la ĵuron.

Kr. Georgiev tradukis kelkajn rakontojn de bulgaraj verkistoj, kiuj aperis en „Bulgara Esperantisto“ aŭ kiel apartaj libretoj („Avo Joco rigardas“ de Iv. Vazov, „La edziĝfesto de Vasilena“ kaj „Trezo“ de J. Jovkov — aperintaj kun aliaj rakontoj de Jovkov en kunlaboro de Ĥr. Marinov Gorov kaj David Sasonov en libreto sub titolo „Elektitaj rakontoj“).

En 1956 Kr. Georgiev akceptis la proponon de la ĉina esperantisto Jang Tie-ing el Pekino kunlabori al li kun celo traduki en Esperanton ĉiujn verkojn de Elin Pelin kaj Jang-Tie-ing retraduku ilin en la ĉinan lingvon. Kr. Georgiev tradukis kaj sendis al Pekino la volumon I „Somera tago“, volumon II „Cikoniaj nestoj“, kolekton rakontoj „Sub la monaĥeja vito“, „Fabeloj kaj rakontoj por infanoj“, la kolekton rakontoj „Mi, vi, li“.

La agado kaj la verkoj de Kr. Georgiev estas nerompebla monumento de lia modesta, sed sindona figuro de laborema bulgara esperantisto.



## LETEROJ EL FREMDLANDO

### ESTIMATAJ SAMIDEANOJ,

Antaŭ kelka tempo mi bone ricevis vian ekzempleron de la libro de Todor Ĵivkov senditan al nia Biblioteko. Kvankam mi tuj studis la libron kaj multon lernis el ĝi, pro mal-sano kaj troa laboro, mi ne povis pli frue skribi al vi. Nun mi tion faras, samtempe, petante vin transdoni miajn dankojn al la Redakcio de Nuntempa Bulgario, de kie mi jam dum jaroj ricevadis ilian tre valoran ilustritan revuon kaj lernas multon pri la Oriento de Eŭropo el ĝi. Krom tio „Bulgara Filmo“ estas regule ricevata de mi, kaj mi lernas koni la animon kaj spiriton de la bulgaroj kaj Bulgario moderna.

Mi rememoras, ke en la somero de 1932, kiam mi veturis tra Eŭropo, precipe Germanio kaj Ĉeĥoslovakio, mi hazarde renkontis tre simpatiajn junajn bulgarojn en Brno, Moravio, studentoj de Inĝeniera Altlernejo. La esperantistaj bulgaroj invitis min al sia loĝejo, kie mi tagmanĝis kun ili, kaj mi scias, ke iliaj manĝaĵoj estis tre spicaj, kun papriko kiel en la Azia Oriento. Eble tiuj patriotoj pereis dum la milito!

Ĉiu esperantaĵo venanta el Bulgario estas en modela Zamenhofa Esperanto, senerara, interesa kaj instrua, la ilustrita revuo „Nuntempa Bulgario“ povas kompare stari apud kia ajn publikaĵo okcidenta, angla, kaj en Esperanto oni nun ne havas egalan revuon, almenaŭ mi ne ricevas tian. Nur „El Popola Ĉinio“ estas alia bonega ilustrita revuo en Esperanto.

Krom la artikoloj kaj rakontoj, min tre interesas la vivo en libera Bulgario, kresko de socialismo kaj studoj en Esperanto-lingvo kaj historio. Mi gratulas amikojn bulgarajn kaj deziras al Bulgario longan evoluon, liberon kaj progreson en ĉiu sfero. Bonvolu transdoni aŭ publikigi miajn dankojn al la aliaj sendantoj de valora informo al mi el Bulgario al Cejlono. Kiam ni havos decajn esperantaĵojn, ni sendos al vi. Ni atendas junan britan esperantiston veni kiel APO sendito al Cejlono por vigligi Esperanto-movadon ĉe ni. Kiam samideanoj el Bulgario vizitas Cejlonon, ili nepre vizitu min, nur 200 km de la ĉefurbo Kolombo Bandarawela, la fama saniga loko en Azio, la „Riviero kaj Aĵoj“ de Sudazia regiono

Via en Esperanto servo sincere: Njanasatta THERO

### DEZIRAS KORESPONDI

#### BULGARIO:

GABROVO, str. Nikola Vojnovski 64, MITKO KOLEV MITFV — 22 jara junulo.

DRJANOVO — str. Iv. Vladkov 21, NEJKO MANEV per Il. PK, kaj revuoj ktl.

SSSR. ROSTOV na DON, Severnij poselok, str. Bezimennaja 14, kv. 26, N. A. Kvaŝennikova, instruistino kun serloza viro pri interesaj temoj. La leterojn afranku per belaj poŝtmarkoj.

ROSTOV na DON, str. Engels 101 loĝ. 1 S. I. Kletenik per leteroj bele afrankitaj.

TALLIN. Estonskaja SSR, Sade tn. 1 kart. 1 — s-ino Svi Iell.

TATARSKA ASSR, Severny Nurlaty, ul. Sadovaja 23, Trigulov Ibrahim Rahimoviĉ interŝ. L. Pl, PM, Il. gazetojn.

LVOV, 5, poŝtrestant do vostrebovanla — Valentin A. Melničuk, 24 jara studento de medicino, pri ĝazmuziko, modernaj dancoj kaj interŝ. BK. muziknotojn, esp. kaj aliajn gazetojn, revuojn, librojn kun ĉiuj landoj.

MOSKVO, K-9, str. de Gercen 19, Klubanoj de Esperanto-Sekcio de la Centra Kulturdomo de medicinistoj.

HUNGARIO, HODNEZÓVASASHELY, Dózsa György lernejo, Nyár útca Elisabet Abt., instruistino, por 14 jaraĵ geknaboj, pioniroj kluj interŝanĝos BK.

POLLANDO, KRAKOV, ul. Basztowa 15 m7. Kristina Sienicka, por nacia kulturo, literaturo, teatro, arto kaj vivo.

### REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,  
Kiril DRAĴEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis: P. Georgieva

Formato 71×100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝtkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia; mendo №7450/61

**СП. „ВСЕСТРАННИ УСЛУГИ“ ПРИ СГНС**

Отдел за услуги и самообразование

**ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ**

София, бул. Дондуков 51, — пощ. кутия 222

За учебната 1961—1962 год. се приемат курсисти от цялата страна

по

**ЕСПЕРАНТО**

за начеващи и напреднали

Разработени са нови учебни свитъци от Кунчо Вълев и Михаил Лангов под редакторството на Ив. Сарафов. Лекциите са пригодени както за задочно, така и за присъствено изучаване на есперанто. Завършилите, в края на учебната година ще получат дипломи.

Побързайте да поискате подробни сведения за записване в курсовете, които ви дават възможност основно да усвоите Есперанто

**BULGARA ESPERANTISTO**

aperos monate en sama amplekso dum 1962. Jara abonkotizo — 12 levoj gis la 31-a de decembro 1961 kaj post tiu dato — 2 us. dol. аў 2 rubloj.

**РАСО** monata jara abonkotizo 12 levoj, аў 2 us. dol.

Абонирането за сп. „**NUNTEMPA BULGARIO**“ за България и чужбина ще става **само чрез пощенските станции.**

За **БЪЛГАРИЯ**: годишен абонамент — 24 лв. За **АЛБАНИЯ, ПОЛША, РУМЪНИЯ, УНГАРИЯ, ЧЕХОСЛОВАКИЯ** и **ЮГОСЛАВИЯ**: год. абонамент — 13,45 лв. За **ВСИЧКИ ОСТАНАЛИ СТРАНИ**: — 24 лв.

**Всички пощенски станции в страната приемат абонаменти за следните чуждестранни есперантски списания:**

**POLA ESPERANTISTO** годишно 6 книжки, абонамент — 9,60 лв.

**EL POPOLA ĈINIO** годишно 6 книжки, абонамент — 4,95 лв.

**VIETNAMIO ANTAŬEN MARŜAS** годишно 4 книжки, абонамент — 6,40 лв.

**HUNGARA VIVO** годишно 4 книжки, абонамент — 16,64 лв.

**Краен срок за абониране: за чуждестранните списания — 10 ноември 1961 г., за „NUNTEMPA BULGARIO“ — 30 ноември 1961 г.**

